


# CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO  
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 111**

***N-RO 13 (81), MARTO 2020***

## Enhavo

### ***Dediĉe al la 8-a de marto – kreado de la virinoj:***

Klara Ilutoviĉ. V. D. Polenov en Moskvo 3

### ***Originala prozo***

Tatjana Auderskaja. Printempaj revoj 5

### ***Originala poezio***

Mikaelo Bronŝtejn. «Nemultaj restis, vere, de l'praepoko»

Nikolao Neĉaev. Novaj poemoj

### ***Jubileoj. Tradukita poezio***

Poemoj de Boris Pasternak en tradukoj de L. Novikova

Poemoj de Jevgenij Baratinskij en tradukoj de V. Melnikov

### ***Originala prozo***

Vladimir Opletajev. Reveno 10

Ilja Gnusarev. Kanto de l' kato 11

### ***Jubileoj. Rusa historio***

Vladimir Lenin. Memore al Hercen. Tradukis Jurij Finkel

### ***Kantoj***

Kolumbo trovis novan teron. Popola studenta kanto. Tradukis Ludmila

Novikova 18



# *Dediĉe al la 8-a de marto – kreado de la virinoj*

## *Originala poezio*



*Klara Ilutoviĉ (Elektrostalo)*

### **V. D. Polenov en Moskvo**

Renkontas tenero de moskva korteto,  
Kreskegas verdaĵoj sur lag’.  
Orbrila arbar’ en aŭtuntaleto.  
Neĝfresta kvieto de tag’.

Jen iuj ĉu timas Golgoton kaj penas  
Ĝin vidi per for a okul.  
Plorantajn virinojn triumfe alvenas  
Jubil’ pri la Reviviĝul’.

Kortuŝe je sia junec’ pekulino  
Ĉe furiozanta homreg’.  
Haltigas ĝin vortoj de l’ sava kulmino:  
“Sed kiu do estas sen pek’?”



Lascive rigardas al tri junulinoj  
Ilia despoto-sinjur’.  
Silento de l’ timo. La sklavaj destinoj.  
De l’ patro koler’ kaj dolor’.

La hom’ super muro, ŝtonegoj kaj montoj –  
La reĝo de l’ tempo kaj spac’  
En foren vokantaj lin penshorizontoj  
De la altspiriita sagac’.

Beleg’ de l’ natur’ petas halti vivondon.  
Apudas jubil’ kaj sufer’.  
La granda pentristo bildigas la mondon  
En ĝiaj koloroj kaj ver’.



## Mi legas Kalevala-n

En imponaj arbaroj kaj lagoj  
Spiras viv' de rigora natur'.  
Je mirakloj de prodoj kaj magoj  
Plenas vojo, danĝer', aventur'.

En la virga naturo ĉe dioj  
Ĉiu ŝton' pretas iĝi amik'.  
Ĉiopovo de sorĉoj-magioj  
Turnas kapon je sia efik'.

Akvofalo kaj maro survoje,  
Venĝveneno, mortiga sieĝ'...  
Kaj denove, kaj ree, refoje  
Savas neatendeble la preĝ'.

Plu torentas kruelaj elprovoj  
Tra l' fabele korstreĉa etos'.  
Fluos preĝoj, esperoj kaj trovoj.  
Sorĉe vivos la granda epos'.

Mondo kvazaŭ mirinde reala  
Vokas kante el griz' de l' rutin'.  
Vagas mi vojon de "Kalevala"  
Kaj vagemas plu ĝis ties fin'.





## *Originala prozo*

### **Printempaj revoj**

#### *Tatjana Auderskaja (Odeso)*

Densiĝis krepusko.

La kapoj sin klinis unu al la alia, la interparoloj fariĝis pli obtuzaj. Sed des pli arde brilis en malluma ĉambro nesatigebla brulanta malamam.

– Oni devas mortigi lin. Li ne devas vivi. Li ne rajtas vivi. Ne regu nin la persono, kiu ĉiuflanke superas nin.

– Jes, tio vere neelteneblas. Ĉiutage, ĉiuminute konscii, ke li reale estas supera: scias pli multe, pli rapide pensas, pli sukcese solvas la problemojn, kaj ĉiuj liaj solvoj estas ĝustaj! Ili gvidas al la venkoj, sed tiuj venkoj estas LIAJ!

– Kaj ni ne povas kundividi ilin! Ni ne farus, ne kondukus tiel, kiel li, kaj do ne povas senti nin venkintoj, kvankam ni servas al li. Li ne estas nia, kaj ni ne estas kun li. Liaj venkoj ne estas niaj venkoj.

– Li konstante humiligas min per la tuta sia vivo mem. Kial li sukcesas en ĉio? Kial oni amas lin, sed min ne? Li eĉ malamikojn pardonas, kaj ili transiras al lia flanko. Sed miaj malamikoj ja malamas min!

– Jes, jes! Ĝuste tion mi neniam pardonos al li. Mi scipovas batali, mi konas la malamamon al la malamiko, kaj tiu malamam gvidas min en batalo. Mi neniam kompatis iun, kaj oni ne kompatis min. Sed li – pardonas! Kaj venkas pli ofte, ol mi! Mi ne toleros tion!

– Kaj mi lin malamas pro tio, ke li povas pli multe, ol ordinaraj homoj en ordinara vivo. Kian rajton li havas esti supera? Rompi ĉiujn regulojn, stari super la amaso? Li povas samtempe legi, paroli kaj skribi, sed normala homo ne! Tio ne estas juste!

– Ankaŭ mi ne povas legi kaj paroli simultane. Kial li povas? Mi ne volas, ke ekzistu iu, kiu estu pli saĝa, pli lerta, pli prudenta, ol mi; ke iu povu kaj scipovu pli multe! Kaj se tia homo ekzistas – li ne ekzistu plu! Ne ekzistu iu pli dotita, pli perfekta, ol mi!

– Jes, vi ĉiuj pravas. La plej neeltenebla afero estas toleri la regadon de persono, kiu regas nin laŭmerite, laŭ siaj realaj avantaĝoj, kaj ni eĉ ne povas kontentigi nin per la kliŝoj kiel “Eĉ la Suno havas makulojn” kaj “Ajna homo estas neglektinda humila vermo”. Jes, ni ĉiuj estas senbrilaj kaj senpovaj, sed ni multas! Ni povas ataki lin ĉiuj kune, kaj li mortu!

(Ĉiuj kune): Li mortu!

Densiĝis krepusko.

Estis vespero de la 14a de marto de 44a jaro a.K.





## *Originala poezio* *Mikaelo Bronŝtejn (Tihvino)*

\* \* \*

Nemultaj restis, vere, de l'praepoko,  
kie ekfloris nia Verda Ĝarden' .  
Ja estas tempo, kiu staras sur loko,  
kaj estas ni, kiuj moviĝas plu en  
vortico brua de atingoj kaj perdoj,  
el kiuj vere konsistiĝas la viv',  
kaj estas ni, kiuj restadas plu verdaj,  
kredante lingvon nian sen perpektiv' .

La zamenhofa dir' pri "homoj kun homoj"  
verŝajne taŭgas ne por ĉiu person' .  
La vortoj veraj, kaj – por ni – aksiomaj,  
ne ĉiun ulon rekonvinkis al bon' .  
Sed vivas ni , kaj ni plu provas agiti,  
eduki, voki, semi juston en mond' .  
Se ni sukcesis eĉ nur kelkajn invititi, -  
pli vasta iĝis dank' al ni nia rond' .

Ne estis glata nia viv', nek facila, –  
facilas vivo nure por sapvezik', -  
La amikaro tamen donis al ni la  
deziron vivi kaj labori, amik' .  
Do daŭru, daŭru l' viv-vortic' rotacia!  
Eĉ se kun kelkaj problemetoj por san',  
ni estas vere ja feliĉaj en nia  
amika sent' eterna – mano en man' !





## *Nikolao Nečâev (Irkursko)*

### **Vivo printempas**

Viv' printempas,  
Krei tempas,  
Plumon trempas  
Inken mi.

### **Kreemo**

Mia koro metaforas  
Ĉar kolomboj nun sufloras  
Kvere al mi rimon, temon.  
Donas al mi kver' kreemon.

### **Lirikulo**


Mi en marto lirikulas,  
Pepas, trilas kaj rukulas  
Rime, ritme, metafore  
Ĉar la koro vivas flore.

## *Jubileoj*

### *Tradukita pozio*

**“En ĉio sekvas min dezir’  
pri fos’ ĝis bazo...”**

**(omaĝe al 130-jara jubileo de  
naskiĝo kaj 60-jara datreveno de  
la morto de Boris Pasternak)**



Unu el la plej grandaj rusaj verkistoj, poetoj kaj prozistoj, de la 20-a jarcento estas Boris Pasternak. Li naskiĝis la 10-an de februaro 1890 en Moskvo. En ĉi-jara februaro okazis lia 130-a jubileo.

Fontoj de la poetika stilo de Pasternak-poeto estas en la modernisma literaturo de komenco de la 20-a jarcento, en la estetiko de impresionismo. Liaj fruaj

versaĵoj estas filozofie sencprofundaj, forme komplikaj, saturitaj de metaforoj. Unu el la plej famaj poemoj de tiu periodo estas “Jen februar”. Kun plum’ ĝemplori”, verkita en 1912. La unuajn versaĵojn Pasternak publikigis en 1913.

Sian ĉefverkon – la romanon “Doktoro Ĵivago” Pasternak finverkis en 1955. Pro malpermeso de ĝia publikigo en USSR, li transdonis la romanon eksterlanden, kie ĝi estis publikigita en 1957. Ĝuste pro tiu ĉi romano Pasternak iĝis mondfama verkisto kaj en la jaro 1958 estis honorita per la Nobela premio en branĉo “literaturo”. La premio estis atribuita al Pasternak “pro gravaj atingoj en la nuntempa lirika poezio kaj pro daŭrigo de la tradicioj de la granda rusa epopea romano”. Tamen pro la terura persekutado, kiun iniciatis kontraŭ la verkisto sovetiaj oficialuloj, inkluzive plurajn literaturistojn, Pasternak estis truddevigita renonci la premion. Do, la sorto de Pasternak estis tre drameca, same kiel de pluraj niaj klasikuloj.

En unu el la lastaj poemoj de Pasternak – “Neĝas jam” (1957) li reflektis siajn travivaĵojn de tiu ĉi malprospera periodo, pro kio la poeto jam nevole pensis pri la finalo de sia vivo (kiu okazis en majo 1960, do ĝuste antaŭ 60 jaroj). En la versaĵo ni bone sentas motivon de la rapida preterpaso de la vivo.

La romano “Doktoro Ĵivago” estas ne nur proza epopeo, montranta vastegan bildon de vivo de la rusa intelektularo dum la drameca periodo inter komenco de la 20-a jarcento kaj la Granda Patria milito. La romano ankaŭ entenas altan poezion en formo de versaĵoj, kreitaj de la ĉefa personaĵo Jurij Ĵivago. Unu el tiuj ĉi versaĵoj “Nokta vintro” iĝis tre populara kaj por ĝi estis komponitaj pluraj melodioj por la romanoj, kiujn plenumadis kaj plenumadas multaj famaj kantistoj.

En la jaro 1956 Pasternak verkis la poemon “En ĉio sekvas min dezir’ ”, en kiu li esprimis sian komprenon de esenco de kreado. Tiu ĉi poemo do estas programa deklaro de la poeto.

La poemo de Pasternak “Jam neniu venos hejmen” (1931) iĝis unu el la plej popularaj en nia lando dank’ al la romano, kies melodion kreis nia samtempulo, fama bardo Sergej Nikitin. La romano sonis en la kinofilmo “Ironio de la sorto”.

*Ludmila Novikova*

### **Зимняя ночь (Мело, мело...)**

Мело, мело по всей земле  
Во все пределы.  
Свеча горела на столе,  
Свеча горела.

Как летом роem мошкара  
Летит на пламя,  
Слетались хлопья со двора  
К оконной раме.

### **Vintra nokto**

Sur tuta ter’ blovadis vent’,  
Blizard’ ululis.  
Kandelo brulis sur la bret’,  
Kandelo brulis.

Kiel muŝaroj en somer’  
Aspiras flamon,  
Neĝeroj celis el ekster’  
Fenestran framon.



Метель лепила на стекле  
Кружки и стрелы.  
Свеча горела на столе,  
Свеча горела.

На озарённый потолок  
Ложились тени,  
Скрещенья рук, скрещенья ног,  
Судьбы скрещенья.

И падали два башмачка  
Со стуком на пол.  
И воск слезами с ночника  
На платье капал.

И всё терялось в снежной  
мгле,  
Седой и белой.  
Свеча горела на столе,  
Свеча горела.

На свечку дуло из угла,  
И жар соблазна  
Вздыхал, как ангел, два крыла  
Крестообразно.

Мело весь месяц в феврале,  
И то и дело  
Свеча горела на столе,  
Свеча горела.

1946

### Никого не будет в доме

Никого не будет в доме,  
Кроме сумерек. Один  
Зимний день в сквозном проеме  
Незадернутых гардин.

Только белых мокрых комьев  
Быстрый промельк маховой,  
Только крыши, снег, и, кроме  
Крыш и снега, никого.

Sur vitro sagon kun ringet'  
Neĝvent' modluris.  
Kandelo brulis sur la bret',  
Kandelo brulis.

Sur la plafon' en flamreflekt' –  
La ombra drivo.  
De l' brakoj, kruroj krucoplekt',  
Krucig' de l' vivo.

Ŝueto falis kaj malhel'  
Ĝin tuj forglutis.  
Kaj vaksaj larmoj de l' kandel'  
Sur robon gutis.

Dronigis ĉion neĝovent',  
En grizon rulis.  
Kandelo brulis sur la bret',  
Kandelo brulis.

Blovtremis flamo de l'kandel',  
Kaj ardo tenta  
Flugilojn levis de anĝel'  
En form' krucmeta.

Tutfebruare blovis vent',  
Blizard' ululis.  
Kandelo brulis sur la bret',  
Kandelo brulis.



### Jam neniŭ venos hejmen

Jam neniŭ venos hejmen,  
Krom krepusko vintra nur,  
Kiu min rigardas svene  
Tra kurtena embrazur'.

Nur de neĝaj flokoj movoj,  
Traflugantaj en humid',  
Nur tegmentoj, neĝ' kaj krome  
Estas jam nenia vid'.

И опять зачертит иней,  
И опять завертит мной  
Прошлогоднее унынье  
И дела зимы иной.

И опять кольнут донине  
Не отпущенной виной,  
И окно по крестовине  
Сдавит голод дровяной.  
Но неожиданно по портъере  
Пробежит вторженья дрожь, –  
Тишину шагами мера,  
Ты, как будущность, войдешь.

Ты появишься из двери  
В чем-то белом, без причуд,  
В чем-то, впрямь из тех материй,  
Из которых хлопья шьют.

1931

### Снег идёт

Снег идёт, снег идёт.  
К белым звёздочкам в буране  
Тянутся цветы герани  
За оконный переплёт.

Снег идёт, и всё в смятеньи,  
Всё пускается в полёт, –  
Чёрной лестницы ступени,  
Перекрёстка поворот.

Снег идёт, снег идёт,  
Словно падают не хлопья,  
А в заплатанном салопе  
Сходит наземь небосвод.

Словно с видом чудака,  
С верхней лестничной площадки,  
Крадучись, играя в прятки,  
Сходит небо с чердака.

Потому что жизнь не ждёт.  
Не оглянешься – и святки.  
Только промежутки краткий,  
Смотришь, там и новый год.

Kaj denove prujno haĉos,  
Ree trafos min katen'  
De pasinta malkuraĝo,  
De alia vintro splen'.

Kaj denove min pikados  
Sen absolvo mia kulp',  
Premos la fenestran kradon  
La hejtmanka varm-postul'.  
Sed subite tra kurteno  
Kuros la enira vent', –  
Kiel la estonta beno  
Vi aperos en silent'.

Venos vi en blanka io,  
Mi ne certas pri konsist'.  
Ĉu el tiu materio,  
Kiun uzis flok-kudrist'?

### Neĝas jam

Neĝas jam, neĝas jam.  
Kaj la geraniaj floroj  
Al steletoj blankkoloraj  
Strebas tra l' fenestra fram'.

Neĝas jam, kaj en malordo  
Ĉio ŝvebas en nebul', –  
Ŝtupoj de la nigra pordo<sup>1</sup>,  
De l' vojkrucio postangul'.

Neĝas jam, kaj en pelmel'  
Ŝajnas, ke ne neĝaj flokoj,  
Sed en blankflikita froko  
Surteriĝas la ĉiel'.

Kvazaŭ el mansard-angul'  
De la supro de l' ŝtuparo,  
Kaŝludante, sen paŝkarno  
Descendadas la strangul'.

Ne atendas vivo ĉar :  
Venos tuj Kristnaska festo  
Por nelonga kun ni resto.  
Post moment' jam nova jar'.

---

<sup>1</sup> En la pasintaj jarcentoj rusiaj urbaj domoj krom la ĉefajn (aŭ “paradajn”) enirejojn havis ankaŭ la malantaŭajn (aŭ la «nigrajn»).

Снег идёт, густой, густой.  
В ногу с ним, стопами теми,  
В том же темпе, с ленью той  
Или с той же быстротой,  
Может быть, проходит время?

Может быть, за годом год  
Следуют, как снег идёт,  
Или как слова в поэме?

Снег идёт, снег идёт,  
Снег идёт, и всё в смятении:  
Убелённый пешеход,  
Удивлённые растенья,  
Перекрёстка поворот.

1957

### **Февраль. Достать чернил и плакать...**

Февраль. Достать чернил и плакать!  
Писать о феврале навзрыд,  
Пока грохочущая слякоть  
Весною черною горит.

Достать пролетку. За шесть гривен,  
Чрез благовест, чрез клик колес,  
Перенестись туда, где ливень  
Еще шумней чернил и слез.

Где, как обугленные груши,  
С деревьев тысячи грачей  
Сорвутся в лужи и обрушат  
Сухую грусть на дно очей.

Под ней проталины чернеют,  
И ветер криками изрыт,  
И чем случайней, тем вернее  
Слагаются стихи навзрыд.

1912, 1928

### **Во всём мне хочется дойти...**

Во всём мне хочется дойти  
До самой сути.  
В работе, в поисках пути,  
В сердечной смуте.

Dense-dense neĝas jen.  
Ĉio svagas en la drivo.  
En samritmo, sama splen'  
Aŭ kun sama senreven'  
Eble perterpasas vivo ?

Eble same jar' post jar'  
Pasas kiel neĝerar',  
Kiel la recitativo ?

Neĝo falas sen regul',  
Ĉio estas en perturbo :  
Blankkovrita trapasul',  
Mirigita flaŭro urba,  
De l'vojkruco postangul'.

### **Jen februar'. Kun plum' ĝemplori...**

Jen februar'. Kun plum' ĝemplori  
Pri la verkata vintra vers' !  
Dum strebas kotvetev' kolori  
Per brue nigra primaver'.

Fiakron preni. Je ses grivnoj<sup>2</sup>,  
Tra sonorad', tra rada knar',  
Transveni al la pluvaj strioj,  
Bruantaj pli ol ink' kaj larm',

Kie de arboj frugilegoj,  
Kiel brulnigra pira ar',  
Sobflugos flaken sub falego  
De trist' al fundo de l' rigard'.  
Sub ĝi la nigra ter' aperas,  
Kaj vent' trivitas pro kriem',  
Ju pli hazardas, des pli veras  
La versoj de plorega ĝem'.

### **En ĉio sekvas min dezir'...**

En ĉio sekvas min dezir'  
Pri fos' ĝis bazo:  
En la labor', en serĉa ir',  
En kor-ekstazo.

---

<sup>2</sup> *Grivno* (alia ruslingva nomo « *grivennik* ») – rusa monero je 10 kopekoj el arĝento, kiuj estis produktata en Rusio ekde 1701 ĝis la 1930.

До сущности протекших дней,  
До их причины,  
До оснований, до корней,  
До сердцевины.

Всё время схватывая нить  
Судеб, событий,  
Жить, думать, чувствовать, любить,  
Свершать открытия.

О, если бы я только мог  
Хотя отчасти,  
Я написал бы восемь строк  
О свойствах страсти.

О беззаконьях, о грехах,  
Бегах, погонях,  
Нечаянностях вопыхах,  
Локтях, ладонях.

Я вывел бы её закон,  
Её начало,  
И повторял её имён  
Инициалы.

Я б разбивал стихи, как сад.  
Всей дрожью жилок  
Цветли бы липы в них подряд,  
Гуськом в затылок.

В стихи бы я внёс дыханье роз,  
Дыханье мяты,  
Луга, осоку, сенокос,  
Грозы раскаты.

Так некогда Шопен вложил  
Живое чудо  
Фольварков, парков, роц, могил  
В свои этюды.

Достигнутого торжества  
Игра и мука –  
Натянутая тетива  
Тугого лука.

1956

Ĝis fondo de la pasintec',  
De la epoko,  
Ĝis fundamento, ĝis esenc',  
Ĝis kerna loko.

Mi strebas teni je faden'  
Ĉiujn eventojn,  
Kaj pensi, ami en sentplen',  
Fari inventojn.

Se mi kapablus al sendorm',  
Al pacienco,  
Mi verkus kurte en versform'  
Pri l' pasi-eco.

Pri malleĝecoj, pri pekar',  
Pri persekutoj,  
Pri hazardaĵoj en hastfar',  
Polmar', kubutoj.


Mi trovus fonton de l' pasi'  
Kaj ties kernon,  
De ĉiu nom' ripetus mi  
Komencliteron.

Mi plantus versojn en ĝarden'  
De la kor-ardo,  
Kaj florus la tilia ĉen'  
Arbo post arbo.

Aldonus mi al versa vers'  
Diversaromojn  
De rozoj, herboj, menta freŝ',  
De l' tondro sonojn.

Sammetis iam mag' Ŝopen  
La sorĉabundojn  
De boskoj, parkoj de l' bien'  
En la etudojn.

La lud' kaj la turment'  
ĝis sven'  
Por triumffesto  
Similas al la  
streĉtenden'  
De arbalesto.



*La supre prezentitajn tradukojn de la poemoj de Boris Pasternak  
efektivigis  
Ludmila Novikova (Moskvo)*



## La 2-an de marto – 220-jara jubileo de Jevgenij Boratinskij

Jevgénij Abrámovič Boratinskij [Baratinskij]<sup>3</sup> (Боратынский, аŭ Баратынский, 1800-1844) naskiĝis en poldevena nobela familio en Tambova gubernio. En 1812 li eklernis en la Peterburga suboficira lernejo, sed en 1816 li estis eksigita por ŝtelo, kaj al li estis malpermesita ŝtata servo. Nur en 1819 Baratynskij denove armeaniĝis kiel simpla soldato en Peterburgo, kaj en 1820 kiel suboficiro li estis sendita por kvin jaroj al Finnlando. Oficiriĝinte en 1825, li sekvajare edziĝis kaj forlasis la armeon. Aŭtune 1843 Baratinskij forveturis al Francio, kaj poste al Italio. En Napolo li malsaniĝis kaj mortis. Baratinskij verkis precipe elegiojn. Ili estis unuafoje presitaj en 1819. Li novisme enmetis en siajn elegiojn psikologion kaj

filozofion. Puŝkin taksis lian Konfeson (1823) kiel la plej bonan rusan elegion kaj ŝatis ankaŭ lian finnan poemon Eda (1824). Grandan popularecon havis ankaŭ Festenoj (1820), Balo (1828, ĝi aperis en Du versrakontoj kune kun Grafo Nulin de Puŝkin) kaj Ciganino (1831). En la 1830aj jaroj la verkoj de Baratinskij iĝis pli mornaj kaj senesperaj. En 1827 kaj en 1835 aperis liaj poemaroj ambaŭ sub la modesta titolo Versoj, kaj en 1842 estis eldonita lia tria poemaro *Krepuskoj*.

\*\*\*

Расстались мы; на миг очарованьем,  
На краткий миг была мне жизнь моя;  
Словам любви внимать не буду я,  
Не буду я дышать любви дыханьем!  
Я всё имел, лишился вдруг всего;  
Лишь начал сон... исчезло  
сновиденье!  
Одно теперь унылое смущенье  
Осталось мне от счастья моего.

(1820)

\*\*\*

Сначала мысль, воплощена  
В поэму сжатую поэта,  
Как дева юная, темна  
Для невнимательного света;  
Потом, осмелившись, она  
Уже увертлива, речиста.  
Со всех сторон своих видна,  
Как искушенная жена  
В свободной прозе романиста;  
Болтуня старая, затем

\*\*\*

Disiĝis ni; la ĉarmo kaj admiro  
Nur efemeris en la vivo-bol';  
Por mi neniam sonos am-parol',  
Kaj ne varmigos min la ama spiro!  
Mi ĉion havis, perdis en moment';  
Ekdormis mi... tuj sonĝo amoplena  
Degelis! Sole nun amaro ĝena  
Al mi postrestis de felîĉa sent'.

\*\*\*

Komence penso trovas sin  
En densaj vortoj de poemo –  
Malklara, kiel virgulin'  
Por la monduma neglektemo;  
Kaj poste, pli kuraĝa jam,  
Edifas ŝi kun preciozo,  
En bril' de ĉiaspeca fam' –  
Edzino, sperta pri la am',  
En romanista flua prozo;  
Plu, babilema oldulin',

<sup>3</sup> Li subskribis siajn poemojn dumaniere, tamen la lastan poemkolekton subskribis *Boratinskij* – sekve, pli sekvendas tiu skribmaniero.

Она, подъемля крик нахальный,  
Плодит в полемике журнальной  
Давно уж ведомое всем.

(1837)

\*\*\*


Всегда и в пурпуре и в злате,  
В красе негаснувших страстей,  
Ты не вздыхаешь об утрате  
Какой-то младости твоей.  
И юных граций ты прелестней!  
И твой закат пышней, чем день!  
Ты сладострастней, ты телесней  
Живых, блистательная тень!

(1840)

### Ропот

Красного лета отравя, муха  
досадная, что ты  
Вьешься, терзая меня, льнешь то к  
лицу, то к перстам?  
Кто одарил тебя жалом, властным  
прервать самовольно  
Мощно-крылатую мысль, жаркой  
любви поцелуй?  
Ты из мечтателя мирного, нег  
европейских питомца,  
Дикого скифа творишь, жадного  
смерти врага.

(1841)



*La supre prezentitajn tradukojn de la poemoj de Jevgenis  
Baratinskij efektivigis*

*Valentin Melnikov (Moskvo)*

*La tekstoj de la tradukoj estas prenitaj el la libro: El la rusa poezio  
Tradukis el la rusa Valentin Melnikov Literatura suplemento al La Ondo  
de Esperanto Kaliningrado Sezonoj 2020, pp. 34-36.*

<https://sezonoj.ru/wp-content/uploads/2020/03/K-supl19.jpg>



Venanta kun aroga ŝriko,  
Ŝi en gazeta polemiko  
Banalon semas laŭ rutin'.

\*\*\*

Konstante en purpur' kaj oro,  
En belo de pasi-torent',  
Vi ne suspiras kun doloro  
Pri perdo de juneca sent'.  
Ol jun-gracioj vi pli ĉarmas!  
Pli pompas sunsubir', ol tag'!  
Pli korpas vi, pli arde varmas  
Ol vivaj, brila ombr-imag'!

### Plendo

Plago de bela somero, muŝo veinda, vi  
kial  
Flirtas, por mia sufer', jen ĉe l' vizaĝ',  
jen ĉe l' man'?'  
Kiu pikilon provizis, kapablan ĉesigi  
arbitre  
Penson en fluga liber', kison de arda  
amor'?'  
Vi el pacema revanto, el fil' de eŭropa  
dorloto  
Faras la sciton sovaĝan, streban al  
mort' de rival'.



## *Originala prozo*

### **La reveno**

*Vladimir Opletajev (Surguto)*

Andreo estis veturanta hejmen. La firmao, en kiu li estis dungita, oficvojaĝigis lin bonŝance por du monatoj en uzinon de mekanikaj instalaĵoj de lia hejmurbo. Li estis inĝeniero-elektristo kaj devis respondeci kaj gvidi muntadon de nova komplika elektra sistemo en ĉiuj fakoj kaj produktoj de la uzino. La tasko estis ampleksa, tre grava kaj interesa, kaj li kiel juna diplomita inĝeniero ambiciis plenumi ĝin inde kaj dece.

Lin antaŭĝojigis ankaŭ revidiĝo kun la gepatroj kaj kun eksaj lernejoj amikoj en la urbo, kie pasis la jaroj de la infaneco. Li intence ĉi-foje ne avertis la gepatrojn pri sia veno, ĉar li deziris prepari por ili agrablan surprizon. Dum kelkaj jaroj post la studentaĝo kaj posta enoficiĝo en granda firmao li estis nur sporade revenanta hejmen dum ferioj kaj festoj. Andreo estis juna kaj jam memstara viro, sed profundanime li ofte sopiris ĉi tiun urbeton sed ne nur ĝin, estis ankaŭ alia kaŭzo, kiu nostalgiiĝis kaj sopirigis lin forte pri la lasta abiturienta jaro en la lernejo.

Preter la trajna fenestro rapide glitis for konataj pejzaĝoj: malnova kajo por riversĥipetoj, vasta gresejo, ĉerande de kiu pigre paŝtiĝis bovinoj. Poste li ekvidis meze de pitoreska arbareto apudurban someran infanan ripozejon, en kiu ankaŭ li ŝatis pasigi semajnfinojn kun geamikoj, kaj, preterinte ĝin, la trajno iom post iom proksimiĝis al la fervojstacio. La urbeto ne draste ŝanĝiĝis en la lastaj jaroj de lia foresto, sed tamen ĝi vidigis multon novan en sia aspekto, kio fornebuligis la bildon de tiu kara kaj neripetebla hejma urbo, en kiu li iam infankreskis. Asfaltitaj stratoj beligis sin per florbedoj kaj akurate tonditaj dekorarbustoj. Ĉie videblis novaj buntaj okulfrapaj kaj trudaj reklamŝildoj, multis butikoj. La urbocentro havigis al si kelkajn betonglacajn pluretaĝajn domegojn kun hoteloj, luksaj apartamentoj kaj grandvendejoj.

Lia neatendita apero ĉe la gepatroj similis subitan ŝtormon kun ondoj da gajaj ekkrioj kaj interkisoj kaj kun freŝiga vento, kies aparta nuanco estis nekaŝata ĝojo kaj amo tiel bone videblaj en la okuloj de la patro kaj patrino. Iliajn ĝojon pliiĝis la informo, ke Andreo pro la oficvojaĝo dum du monatoj restados en la urbo. Post la vespermanĝo la patro konturis programon, kiun li kaj la filo duope povus realigi dum proksimaj semajnoj, sed Andreo devis iom estingi lian entuziasmon pri komunaj fiŝkaptado, fungoplukado kaj multaj aliaj logaj aferoj el la agendolisto de ferie ripozantaj turistoj aŭ pensiuloj, ĉar li venis en la hejmurbon streĉe labori, sed li promesis trovi tempon ankaŭ por iuj familiaj distraĵoj.

La patrino post la familia vespermanĝo komencis sentrude sed insiste remueli sian malnovan temon, kiu multe doloris ŝin kaj vunde skrapetis ŝian virinan kaj patrinan koron. La filo estis sen edzino kaj ne havis propran familion, dum multaj liaj samaĝuloj kaj lernejoj amikoj jam edziĝis kaj eĉ prosperis intertempe patriĝi.

– Ho, kiom da bonaj knabinoj estis ĉirkaŭ vi, – suspiris ŝi kaj bedaŭris, ke li malatentis kaj neglektis ŝiajn provojn konatigi lin kun kandidatinoj el bonstataj familioj.

– Panjo, kiel ĉiam vi vidas min nur apud pufa kokino, kies plumetojn flegas riĉaj gepatroj. – riproĉe li respondis al ŝi kun moketa rideto. – Sed ĉu tio estas sola reala celo de la vivo: lerte edziĝi kaj travivi jarojn sen zorgoj kaj kun solida banka konto? Ĉu kvazaŭ en fermita kaj sterila vitra vazo? La patro kaj vi mem havis nenion antaŭ la geedziĝo. Vi mem estis kreantaj vian propran vivon. Sekve vin gvidis la sentoj, kaj ŝajne via tuta familia vivo pruvas tion, pruvas vian amon. Kial vi direktas nun min al tiu vojo, kiu eble venigos min al prospero kaj komforto sed ŝirmos de mi sentojn kaj amon?

– Apetito venas dum la manĝado, – daŭre argumentadis la patrino, – el firma geedzeco povas elkreski amo. Tre ofte okazas tiel en la vivo, kaj tiaj familioj estas ne malpli feliĉaj ol kreitaj pro nuraj amantoj.

Ŝi memorigis al li, ke antaŭ la studentaĝo li enamiĝis en knabinon el la lernejo.

– Kio rezultis el via amo? Kie estas nun tiu naivulino, kiu la tutan vivon okupis vian menson tage kaj nokte? Ŝi lasis vin sen adiaŭo kaj evidente eĉ sen bedaŭro.

– Mi ne scias, kie ŝi estas nun, – la filo respondis triste, – por mi ŝia subita malapero estis enigmo, kiun mi neniel povas kompreni.

– Certe, ŝi avidis peceton, kiun ŝi ne meritis. Tro simpla ŝi estis. – konkludis rezolute la patrino, kaj per tio finiĝis la dialogo, kiel ĉiam senfrukta, sed kiu ree skuis Andreon per neklarigeblaj cirkonstancoj de tiu malnova okazaĵo.

En sekva tago Andreo devis unue solvi multajn fakajn organizajn problemojn en la uzino, kaj posttagmeze li venis al banko por aranĝi kaj subskribi necesajn financajn dokumentojn. Enirinte la bankejon, li alparolis deĵorantan oficistinon, kaj juna virino, kiu pretis afable helpi la klienton kaj tuj turnis sin al li, konsternis la veninton ĝis neimagebla grado. Kvazaŭ fulmoj frape trapikis Andreon, kvazaŭ altega ondo ruliĝis subite sur lin kaj tute baris lian spiradon. Li mute rigardis ŝin kaj ne povis kredi siajn okulojn. Antaŭ li staris ŝi, vestita en blanka bluzo kun silka koltuko kaj malhela jupo: estis ŝi same svelta, verdokula, ridetanta, kun ĉarmaj blondaj bukletoj ĉe la tempioj. La kelkaj jaroj ŝajne ne lasis iajn rimarkeblajn spurojn sur ŝia vizaĝo sed kredeble eĉ plibeligis ŝin. La oficista deviga kostumo ne povis kaŝi ŝian belforman figuron. Antaŭ li aperis ŝi, kiu neklarigeble perdiĝis tiam, baldaŭ post la abiturienta vespero.

– Ana?



– Saluton. – ŝi respondis trankvile, ne montrante signojn de konfuzo, kvazaŭ ŝi nur hieraŭ adiaŭus lin, sed reale pasis jam pluraj jaroj.

– Ĉu vi revenis en la urbon?

– Ĉu ankaŭ vi revenis ĉi tien? – ŝi redemandis lin, ne respondinte lian demandon.

– Jes, nur hieraŭ, pro mia afervojaĝo. Mi laboros dum iom da tempo ĉi tie en la uzino. Li balbute komunikis al ŝi la kaŭzon de sia reveno en la urbon.

– Mi tre ĝojas vin vidi... – li diris al ŝi. – Fakte ne, vi devas scii, mi tre-tre-tre ĝojas vin revidi! – li emfaze ripetis siajn vortojn, finfine iom rekonsciiginte post la evidenta senkonsileco.

– Vi fariĝis vera viro. Mi ne povis vidi antaŭe, ke vi havis barbeton. Tute nekutima aspekto. – ŝi konstatis mediteme.

– Sekve ni havas pretekston rekonatiĝi en nia nuna aspekto. – li rapide eldiris sian ideon, timante, ke Ana ĉesigos la interparolon, kaj la hazarda renkontiĝo ne havos postsekvojn.

– Sed vi aspektas nun tiel, kiel mi memoras vin de antaŭ jaroj. Ĉu la jaroj tute ne povis vin tuŝi? – Andreo ravite konfesis al la junulino.

– Ili tuŝis min tamen, eĉ pli ol tio estis necesa... – ŝi respondis kurte.

Ana devis plu plenumi siajn oficajn taskojn. Sed Andreo, haviginte al si bezonatajn financajn dokumentojn, antaŭ ol foriri el la banko, promesis al Ana sekvatage viziti ŝin en la oficejo post laborfino.

La posta tago de Andreo estis tumulta, eĉ dum la manĝopaŭzo li havis nur kelkajn minutojn por haste trinki taseton da teo kaj konsumi buterpanon, provizitan de la patrino. Sed tutan tempon dumtage lian kapon senĉese incitis la penso pri vespera renkontiĝo kun Ana. Li provis imagi al si la renkontiĝon, kaj li neniel povis detali ĝin, ĉar li memoris nur tiun knabinon el la lernejo, kiun li konis kaj amis antaŭ kelkaj jaroj, sed li nenion sciis pri ŝia nuna vivo. Subite lin mordetis dolore la ĵaluza supozo, ke Ana povus esti edziniĝinta, kaj ĉi tiu supozo kiel malvarma duŝo por iom da minutoj preskaŭ plene forviŝis lian esperon, sed poste li, refutante ĉi tiun eblon, denove malpacience atendadis, kiam la horloĝo montris la horon de laborfino.

Li kure venis al la banko ĝuste, kiam Ana estis jam irona hejmen.

– Sed pardonu min, – ŝi avertis lin. – Mi ne estas sola, kaj laŭvoje ni faros mallongan viziton. Ana estis bonhumora, ŝi ridetis, kaj la vespera suno agrable lumigis ŝiajn harojn kaj vizaĝon. Andreo tute ne kaŝis sian admiron, vidante ŝin facile paŝi tra la sunradioj, kaj liaj rigardoj dronis senrezerve kaj ĝue en ŝiaj verdaj okuloj. Jes, ŝi ne multe ŝanĝiĝis, sed iuj apenaŭ kapteblaj novaj trajtoj elmontris ŝi, malrapide paŝante apud li. Ŝi tenis sin alie ol tiu knabino el liaj antaŭaj revoj. Nun ŝi aspektis pli memfide. Tiel kondutas homoj, kiuj scias sian celon en la vivo kaj faras ĉion eblan por atingi kaj realigi ĝin. Sed samtempe ŝi estis tiu Ana, kiun li memoris kaj neniam forgesis. Andreo komprenis, ke li jam

ŝatis tiujn novajn feblajn trajtojn de Ana, kiujn li antaŭe ne konis kaj kiuj nun delikate kaj fascine ĉarmigis ŝin.

De la hieraŭa vespero Andreon lacige kaj obsede tordis la demando, kiun li hezitis aŭ eĉ malkuraĝis meti, sed li devis ŝin demandi, por finfine revizii kaj plene klarigi al si la tutan tiaman situacion kaj strangan malaperon de Ana el lia vivo.

Ana, – li alparolis ŝin finfine, pene serĉante taŭgajn vortojn, – ĉu vi scias, ke mi vin neniam forgesis kaj tiam estis longe vin serĉanta? Mi ne volis rezignacii kaj perdi vin. Kelkfoje mi vizitis vian avinon, kaj ĉiam ŝi malafable fermis antaŭ mi pardonon. Ŝi traktis min, kvazaŭ mi estus kulpa. Sed tiu kvazaŭkulpo ĝis nun restas por mi enigmo. Fine ŝi sciigis min, ke vi forveturis en alian urbon. Kial? Kial ŝi ne volis paroli kun mi? Kial vi forlasis min sen klarigaj kaj adiaŭaj vortoj?

– Ke la avino nenion komunkis pri mi, estis mia insisto. Ŝi nur plenumis mian peton. Ne kulpigu ŝin. Vi scias, ke mi frue orfiĝis, kaj la avino sola edukadis min. Ŝi estis por mi patrino kaj patro kaj la plej intima amikino. Tiam mi ne havis la pli karan homon en la mondo – ŝi kaj mi estis unu malgranda familio. Sen la avino mi neniam povus supervivi ĉi tiun malfacilan tempon. Sed antaŭ du jaroj ŝi forlasis min por ĉiam.

Ana malgaje suspiris. Iom da minutoj ili iris silente. Poste li demandis ŝin: – Ĉu vi memoras tiun lastan lernotagon post la ekzamenoj? Mi kaj vi promenis en parko ĝis vespero kaj poste desegnis unu al la alia sur la manplato okulon kun la litero A en la pupilo. Tiu estis signo de nia amo: ni ambaŭ, Andreo kaj Ana, ĵuris neniam forgesi unu la alian. Sed ni tiel rapide rompis nian ĵuron. Kial? Ĉu subite ni iĝis blindaj kaj ne plu povis vidi unu la alian? Ĉu eble en la pupilo de via okulo estas desegnita nun alia litero? – Li volis meti al Ana ankoraŭ manplenon da bruligantaj lin demandoj, sed ŝi mangeste silentigis lin.

– Ĉu vi memoras tiun tagon somere, kiam vi decidis konatigi viajn gepatrojn kun mi? – ŝi demandis lin. Tiu ĉi frazo videble estis tre grava por Ana, ŝi rimarkeble emociiĝis.

– Jes, tio estis agrabla familia vespero, mi supozas, kaj ŝajne vi plaĉis al la gepatroj. Sed ĉu ne tuj post ĝi vi malaperis?

– Nu, mi devas memoriĝi al vi, ke ĝi ne tre similis agrablan familian vesperon, almenaŭ mi ne povis konsideri ĝin agrabla, ĉar ĝin ĉeestis ankaŭ via bona konatino Nina, kaj via patrino dediĉis al ŝi multan atenton dum la tuta vespero. Mi havis impreson, ke ŝi intencis min konatigi kun Nina kaj mem apenaŭ interesiĝis pri mi. Ĉu la situacio ne ŝajnis al vi tro bizara?

– Ha jes, Nina estis vica favoratino de mia patrino, kiun ŝi tiusomere volis subŝovi al mi kiel deziratan fianĉinon. Ŝia apero en nia hejmo tiuvespere surprizis ankaŭ min. Panjo estas ĝis nun serĉanta kandidatinojn por bona partio. – Andreo subridetis sarkasme. – Mi ĉiam malatentas ja ŝiajn obsedajn ideojn. Ankaŭ Nina estis hazarda gasto, eĉ eta spureto de ŝi ne restis en mia memoro.

– Sed, pardonu min, pli fortan baton mi ricevis de via patrino, kiam mi aŭdis tiuvespere hazarde ŝian telefonparolon. Ŝi parolis iom laŭte, eble intence ŝi tiel agis, eble ŝi tenis sin ne tute diskrete, kaj mi povis bone kompreni ŝiajn vortojn. Tiel mi sciiĝis, ke mi devenas el ordinara griza homamaso, estas orfa kaj absolute ne taŭgas fariĝi via vivkunulino, ke la patrino ĵuris trovi por vi indan partion. Ŝiaj vortoj kaj kategoria tono, kiajn mi neniam antaŭe spertis en la vivo, tiel frapis min, kvazaŭ mi estis senindulge skurĝata pro ia delikto nekorektebla. Mi ĉion rakontis hejme al la avino, mi ploregis tutan nokton, ankaŭ ŝi ploris kun mi, ĉar la ofendo estis netolerebla, kaj poste ni decidis, ke ĉi tiu paĝo de mia vivo estos fermita.

Aŭskultante ŝin, Andreo fariĝis ĉiam pli kaj pli morna. Nun la puzzle estis komplete kompilita, sed li povis nur miri, kia blinda kaj tro juna li estis tiam pro la korsentoj, ke li ne rimarkis tian senskrupulan ludon de la patrino nek savis kaj protektis ilian amon.

– Kaj ĉu vi fermis ĝin? – li eksklamaciiis konsternite. – Sed vi ne demandis min! Vi ne parolis kun mi, kvazaŭ ne mi deziris fianĉigi vin. Kial? Tio estas ŝatata klaĉtemo de la patrino, sed vi eĉ ne konjektas, ke ŝi malgraŭ propraj fiksjaj ideoj pretis tiam kaj pretas ankaŭ nun akcepti ajnan mian decidon.

– Ho, kia domaĝa miskompreno! – Andreo ne povis kredi la vortojn de Ana. – Kia kruda kaj sensenca miskompreno! Kvazaŭ nimbuso tiuminute falis sur lin subite, kvazaŭ io malluma frapis surdige kaj krude senfortigis lin. Li ne sciis trovi vojon por transiri la abismon de travivitaj kaj jam perditaj por li jaroj.

– Sed mi vin ĉiam amis ... – li diris mallaŭte.

Babilante, ili atingis kortopordon de infanedukejo. Andreo tralegis sur la ŝildo, ke la infanĝardeno estis nomata “Lampiro”. Ana petis lin resti ĉe la enirejo kaj atendi kelkajn minutojn. Tra la krada barilo li vidis geknabojn, prizorgatajn de vartistinoj, promeni kaj gaje kribi kaj petoli sur ludplacetoj en la korta parko.

– Estas interese, kiun lampireton lasis Ana ĉi tie. – Andreo scivolis solvi ĉi tiun enigmon, atendante ŝian revenon.

Baldaŭ li ekvidis, ke sur vojeto aperis Ana, tenante manon de bubo, kiu ĝoje iris apud ŝi, saltetis kaj ion vigle rakontis. La knabeto aĝis ne pli ol kvin-ses jarojn, li estis blondhara, facilmovia kaj gaje ridetanta.

– Miĉjo, mi volas konatigi vin, – Ana turnis sin al la knabeto. – Tio estas Andreo. Ŝi nomis Andreon per la nomo, ne uzante en tia kazo kutimajn epitetajn kromvortojn onklo aŭ sinjoro.

– Bonvolu saluti lin.

– Saluton! – la knabo senĝene alrigardis Andreon kaj aŭdace etendis al li la manon por manpremo, kiel tion kutime faras viroj. Andreo klinis sin kaŭre, por vidi pli bone lian vizaĝon, kaj premis la manon de la knabo.

– Vi estas vera viro. – li diris estime.

– Jes, mi estas viro. Venontjare mi jam vizitos lernejon. Mi estas defendanto de nia familio. Panjo scias tion! – Miĉjo respondis serioze kaj fiere.

Panjo?! – Tiu ĉi vorto kiel hazarda kuglo pretersiblis kaj natendite panikis Andreon. – Ana havas filon! Ĉu Miĉjo estas ŝia filo? – Tiu febla fajrero de espero, kiun li ekdorlotis hieraŭ, malaperis tuj; dum sekundo lia animo sententiĝis tiel, ke li perceptis nur neimageblan kaj preme senesperigan malplenon. Subite li ektimis, ke Ana ekvolos lin tuj adiaŭi, kaj li perdos ŝin denove, jam la duan fojon en la vivo...

Sed Ana kontente ridetis: – Nu, defendanto, gvidu min kaj nian gaston al la hejmo. Ni estas malsataj, kaj nin atendas vespermanĝo.

Dum la restinta vojo ĝis ilia domo Ana, Andreo kaj Miĉjo multe interparolis, kaj kiam ili eniris la loĝejon, la knabo jam konsideris la gaston fidinda amiko. Ana estis en kuirejo preparanta vespermanĝon, kaj Miĉjo volonte montris al Andreo sian ĉambron.

– Mi scias ĉiujn literojn kaj povas kalkuli ĝis milo. – li tuj komunikis al Andreo ĉi tiun fakton, kiu evidente estis por la knabo tre grava. – Kaj mi jam scipovas bone uzi mian tekokomputilon. Ĉu vi vidas ĉe la muro rekon? Mi levas min sur ĝi ĉiutage, ĉar mi volas esti forta, – li daŭrigis. – Viro devas esti forta kaj sana. Ĉu ankaŭ vi sportas? – li demandis la gaston.

– Jes, mi volonte ludas tenison kaj ŝatas piedmigri, tendumi eksterurbe. Tio plaĉas al mi kaj ŝargas min per necesa kaj pozitiva energio. Sed ĉu vi havas seriozajn hobiajn? – li demandis la knabon.

– Somere mi ŝatas bicikli. Nun mi ne povas tion montri al vi, – li klarigis aflikte, – ĉar la biciklo difektiĝis kaj estas riparota. Krome mi multe desegnas. Ankaŭ tion mi ŝatas. Kiu scias, Panjo diras, ke eble mi fariĝos poste dezajnistoj aŭ pentristo. – Miĉjo prenis el la ŝranko albumojn por desegnado kaj metis ilin akurate antaŭ Andreon. Andreo vidis tute infanajn mallertajn krajonajn desegnaĵojn kaj akvarelojn de Miĉjo de antaŭaj jaroj, kaj li povis konstati, ke lastaj bildoj figuris jam sufiĉe aŭtente kaj plastike temojn el la knaba mondo. Sendube la juna pentristo estis kapabla, rapide progresis, kaj kaj konsulti iun fakulon aŭ provi la fakan ekzerciĝon pri pentrado estus por li ne malutila afero. Foliumante albumon, Andreo subite trovis sur iu folio bildon, kiun li tre bone konis kaj kiun li tuj rekonis: tio estis per feltkrajonigo nigrakolare konturita okulo kun la majuskla A en la pupilo.

– Ĉu vi desegnis tion ĉi? – li tuj demandis la knabon.

– Ne, Panjo desegnis la okulon. Ŝi diris al mi, ke per ĉi tiu okulo mia patro ĉiam povas min vidi.

– Sed kie estas via patro? – Andreo tuj senpacience petis lian respondon kaj sammomente riproĉis sin pro sia maldiskreta impulsiĝemo. Lia demando povis embarasi la knabon kaj tuŝi la temon komplikan, eble tabuitan inter Ana kaj la filo. Dum la tuta vespero eĉ unu vorto ne estis dirita de ŝi pri edzo aŭ pri patro de Miĉjo.

Sed Miĉjon tio ne afliktis, li trankvile sciigis Andreon, ke la patron li neniam vidis. – La patro estas nun malproksime, li havas gravajn aferojn, sed iam

li revenos, eble baldaŭ... – li certigis Andreon. Memkompreneble li rakontis legendon, sugestitan al li de la patrino, kaj li kredis ĝin, ĉar sen legendo ne estis eble havi patron kaj esperi kaj atendi lian revenon. La koro de Andreo kunpremiĝis kaj poste furioze ekbatis, forte puŝante la sangon ĝis li sentis doloron en la tempioj. Li fikse rigardis la knabon, atente ekzamenante liajn trajtojn, kaj li ekvidis kaveton sur la mentono, kiu tre similis lian propran, kaj la okulformo de Miĉjo plene kopiis la formon de liaj okuloj. Eĉ la fingroj estis tiaj, kiajn Andreo havis en la infanaĝo! Subite li tiris la knabon al si, ĉirkaŭprenis liajn ŝultrojn kaj eksilentis, ne sciante, kiujn vortojn li devis diri en ĉi tiu momento.

– Certe via patro revenos al vi! Mi scias, ke li tre volas reveni al vi. Ĉu vi volas, ke mi morgaŭ venu al vi? Ni provu kune ripari vian biciklon, kaj vi povas montri vian arton de biciklado. Ĉu la ideo ne estas malbona? – finfine li aŭdigis frazojn, kiuj eble ne tute konvenis al la travivata momento, sed kiuj metis esperigan ponton inter ili ambaŭ.

– Jes, la ideo estas bonega! Mi tre volas tion! – Miĉjo jubilis.

La ĉambrom eniris Ana. La vidata sceno tuj komprenigis al ŝi ĉion, kion ŝi mem ne kuraĝis hieraŭ malkaŝi al Andreo, kaj kio peze turmentis ŝin jam multajn horojn. Ŝi sentis tujan malstreĉiĝon kaj, gaje parolante, per iom solena tono, ŝi invitis ilin al tablo: – Nun, ambaŭ sinjoroj, lasu viajn sekretajn interparolojn kaj volu veni al vespermanĝo! Ĉu vi havas bonan apetiton?

–Jes, Panjo! – ĝojkriis Miĉjo kaj, kaptinte la manon de Andreo, li irigis lin en la manĝoĉambrom.

– Mi revenis! – Andreo mallaŭte flustris al Ana, – Mi revenis por ĉiam, sciu tion. – Li pensis tiel, kaj ĉi tiu penso plenigis lin per feliĉo, kian li ĝis nun ankoraŭ neniam ĝuis en la vivo.

## La kanto de l' kato



### *Ilja Gnusarev (Penzo)*

Ha, stulta pasero! Kien vi flugas tiel rapide? Cu vi ne komprenas, ke vi malhelpas min pensi pri la mondo? Iru al mi kaj ni kune povas observi kiel branĉoj de la pomarboj fleksiĝas pro la vento.

Ah ne, vi tamen decidis forflugi. Stulta birdeto! Sed mi alkutimiĝis al tio, ke ĉiuj ien kuras, flugas, rampas, iras. Senĉese, senhalte, senfine. Kial oni ne povas simple kuŝi kaj ĝui la vivon? De tago al tago mi faras tion. Jes, nun ŝajne pro tio mi estas iom dika, sed mi rimarkis, ke ĉiuj ŝatas kiam vi estas iom dika.

Vi estas pli ĉarma, pli karesinda. Do ne estas senco ĉiam kuri kaj iri ien, kiam eblas simple kuŝi sub la pomarboj. Kiam venas vespero kaj komencas regi krepusko mi iĝas preskaŭ nevidebla. Jes, mi estas nigra, kiel vi

povas rimarki, kaj al mi tio tre plaĉas. Kiam oni tute ne vidas min, oni kondukas eĉ pli stulte ol kutime. Kaj mi ĉion memorfiksas, ĉiun stultajon, por ke ne faru la saman. Kaj mi komprenis, se vi ne volas esti tiel stulta kiel aliaj, simple venu al la ĝardeno kaj ekkuŝu apud mi kaj ni kune komencos observi la mondon. La vivo!

Nun vi scias, ke mi ŝatas kuŝi en la ĝardeno kaj observi ĉion, kio okazas de tago al tago. Sed hodiaŭ estas tia stranga tago, kiu bonŝance sufiĉe malofte venas al la ĝardeno. Tago, kiam okazas nenio. Paseroj ŝajne havas ferian tempom, formikoj ne volas konstrui sian formikejon kaj la homoj kun siaj frenezaj infanoj, kiuj nur celas fortordi mian voston, estas for, ŝajne ili ĉiuj simple malaperis. Tia etoso tedas min. Do, ankaŭ mi estas iom malsata.



*Mi estas malsata kaj mi povas trovi  
Nek freŝan viandon, nek senton de ĝojo!*

Do, mi devas iri al la strato. Mi ne tre emas fari tion, ĉar multe da bruoj estas surstrate. Frenezaj aŭtoj fulmas al diversaj direktoj, kaj mi pensas, ke la ŝoforoj ne komprenas kien ili veturigas sin. Sed en la apuda konstruaĵo – griza alta domo – preskaŭ ĉe la angulo, troviĝas eta vianda butikio. Tio estas mia celo. Mi tre malofte vizitas ĝin. Vizito de la butikio estas ja danĝera afero, ĉu ne? Ne nur freneziĝintaj aŭtoj, sed ankaŭ hundaĉoj, kiuj senĉese vagas en la urbo. Ili ne plaĉas al mi. Pro mia dikeco mi ne estas bona kuranto, kaj mi apenaŭ povas kaŝi min grimpante sur la arbojn. Foje mi pensas, ke se mi renkontos hundojn, mi simple ekkuŝos sur la pavimon kaj kun aroganta mieno akceptos mian morton. Mi tro pigras por savi min. Kaj mi estas tro fiera. Do, unue mi devas kontroli, ĉu estas iuj hundaĉoj surstrate. Aha, ne, la vojo estas libera! Ek!

*Kaj min ne timigas la hundoj mizeraj,  
Nek batoj de l'homoj, nek aŭtoj danĝeraj!*

Sed tamen ekzistas eta problemoj, kiu iom timigas min. Vendisto. La vendisto. La vendisto, granda suk- kaj vivplena mezaĝulo, estas sufiĉe observema kaj gardema homo, kaj ne estas facile nerimarkeble penetri en la butikon por provi ŝteli peceton de la freŝa bovaĵo. Sed ja kiel mi volas manĝi!

Ĉu vi spertis tion? Ĉu vi iam sentis kiel odoras freŝa bovaĵo? Tio estas odoro de varma lakto kaj herboj de vilaĝaj kampoj (kie kompreneble mi neniam estis).

*Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante,  
mi iru por ŝteli viandon!*

Aliaj katoj, kiuj ne havas hejmon, povas simple veni al la pordo de la butikio kaj kun kompatinda rigardo atendi, kiam la milda koro da la vendisto iom degelis kaj li donos peceton da viando.

Kaj mi? Dika, bonaspekta, kies felo brilas kiel somera suno. Nu vi povas imagi, ke mi rajtas ricevi nenion. Komence (tio estis antaŭ kelkaj semajnoj), tamen, mi provis trompi la vendiston. Mi ekstaris tiel, ke mia korpo estu nevidebla, kaj la vendisto povu vidi nur mian belegan vizaĝon. Mi iom atendis, kaj preskaŭ sukcesis, sed pro la damna kamiono, kiu subite aperis kaj eksonis tiel laŭte, ke mi eksaltis kaj mia ruza plano estis malkovrita. Sed por hodiaŭ mi elpensis novan rimedon. Ĉu mi sukcesos?

Ha, jen la butikio. Mi estas atingonta la celon. Fek! Tute neatendite aperas obstaklo, kaj miaj esperoj kaj revoj estis frakasitaj. Hundo! Jes, aperis hundo. Mezgranda nigra-bruna hundaĉo. Do, kompreneble, mi tuj ekkonsciis, ke mi devas fuĝi. La hundo troviĝis preskaŭ du dek metrojn fore, kaj mi esperis ke mi havas tempon por savi min. Mi rapide turniĝis kaj ekkuris hejmen, sed la hundaĉo jam rimarkis min kaj komencis bojante ĉasi min.

Mi kuris kelkajn metrojn, kaj tuj ekanhelis. Kial mi estas tiel dika? Mi haltis kaj decidis ke mi devas akcepti mian morton, kiu venis al mi en aspekto de hundo. Mi estas tiel juna kaj ĉarma!

Mi haltis, mi frontis al la kuranta hundo kaj vidis kiel fulme ĝi alproksimiĝas. Venu, venu, mi jam estas preta! Adiaŭ, stultaj paseroj! Adiaŭ, laboremaj formikoj! Adiaŭ, mia kara ĝardeno kun la pomarboj! Mi ja neniam manĝis pomon en mia vivo! Kaj nun mi devas morti! Ho ve!

*Mi estas juna kato, mi ŝatas flari florojn.  
Kaj estas mi malsata, sed venis mia horo!  
Mi iĝis tiel banala. Mi ne ŝatas tiun versaĵon.  
Mi estas kat' sen iu ajn pretendo.  
Pretendo jam perdita, kaj restas nur silento!*

Denove stultaĵo, pli bone morti!

Hundo! Sed okazis io stranga. La hundo, kiu estas manĝonta min, subite haltis kaj kun surprizo komencis rigardi al mi, kvazaŭ min esplorante. Nu, kion vi atendas? Mordu min! Voru min! Stulta hundaĉo. La hundo staris senmove. Mi ekkuŝis surteren. Ne estas facile stari tiel longe, kiam vi estas streĉita. La hundo bojetis kaj malfermis sian faŭkon! Adiaŭ, mizera mondo! Ho, kial mi ne fintrinkis lakton, kiun mi ricevis matene de mia homo? Lasis mi ĝin por la vespero. Por kio?

Kaj la hundo anstataŭ formordi mian noblan kapon komencis leki min. Fi! Kiel ja tio estis abomena! Min lekis tiu hundaĉo, kaj kiam mi komprenis, ke mia vivo jam ne troviĝas en la danĝero, mi penis liberigi min el la saliva duŝo kaj eĉ pensis, ke pli bone estus, se la hundo mortigus min, ol toleri tiun lekadon.

Mi ekstaris, kaj la hundo kun feliĉa mieno staras kaj ridetas, elbuŝiginte sian langon Fi! Mi komencis rapide lavi min, kaj preskaŭ samtempe turniĝis al hejma direkto. Stulta hundaĉo! Mi trapasis kelkajn metrojn, sed incita spirado de la hundo ne iĝis malpli laŭta. Mi turnis la kapon malantaŭen kaj ekvidis, ke la hundo postsekvas min. Iru hejmen! Kial ĝi staras kun stulta rideto? Mi denove ekkuretis al mia ĝardeno. Post du minutoj mi jam kuŝis en freŝiga ombro de la arboj kaj rimarkis, ke la hundo enŝovis sian kapon tra la barilo kaj rigardas al mi! Iru for!

Sed la hundo iĝis aspekti eĉ pli feliĉa. Subite la kapo malaperis. Bone, nun mi povas trankvile pripensi miajn planojn pri la vespermanĝo, ĉar mi ankoraŭ estis malsata.

*Kuŝante sub arboj en ombro de l'pomoj,  
Al kiuj kuraĝe mi iras.  
Mi ŝatas karesojn kaj zorgojn de l'homoj,  
Kaj kiel la homoj min kisas.  
Kaj min ne timigas la hundoj danĝeraj,  
Nek batoj infanaj, nek gravaj problemoj,  
Ĉar ruza kaj dika kaj tre belaspekta  
Mi estas la kato perfekta!*

La apudaj arbustoj subite ekstremit kaj el ili elsaltis la hundo. Ĝi alproksimiĝis al mi kaj kelkfoje bojetis. Kial vi venis? Kion vi bezonas? Ĉu vi denove volas leki min? Sed la hundo ekuŝis apude kaj komencis profunde spiri. Terure! Mi devas atendi, kiam venis la mastrino kaj forpulis vin, ĉar mi estas tro pigra por fari tion. Pasis iom da tempo kaj mi pensas, ke mi preskaŭ estis dormanta. Kiam mi malfermis la okulojn, la hundo daŭre troviĝas apud mi. Kiel vi nomiĝas? Ho, vi ne povas diri tion, aŭ vi ne scias? Aŭ vi eĉ ne havas nomon? Do, mi povas doni nomon al vi. Sed kiun? Hmmm... Mi iam legis faman romanon nome Robinsono Kruzo. Hodiaŭ estas lundo. Do estu Lundo. Via hunda moŝto Lundo! Hundo-lundo! Kiel sprite!

Ĉesu! Ĉesu leki min denove, vi malbonedukita hundaĉo. Sed la hundo apenaŭ ĉesis sian lekadon. Iru for! Mi ne ŝatas, ke vi okupis mian ĝardenon. Bruo de l' pordo! Silentu! Ĉi tien iras mastrino de la domo, kiu nutras min, kaj nun mi estas tiel malsata, ĉar vi, Hundo-Lundo, malhelpis min atingi viandon. La mastrino ekrimarkis, ke apud mi kuŝis Lundo.

Kia ĉarma hundeto! – ŝi diris ridetante kaj komencis karesi la hundon.

Hej! Kion vi faras? Nur mi estas sola karesinda persono en la ĝardeno.



– Kiel vi nomiĝas, kompatinda hundo? Lundo! Lundo! Mi provis klarigi al la mastrino. Sed ŝi tute ne rimarkis tion.

– Vi estas tiel bela!

Ne, nur mi estas bela, kion vi diras? Mi devas ĉesigi tiun maljustaĵon!

– Se vi volas, vi povas resti ĉe ni, kaj loĝi kun nia kara kato!

Kion vi diris? Mi subite saltis sur ŝiajn genuojn kaj provis ĉesigi la maljustan karesadon de la hundo. Mi, mi estas unusola persono, kiu indas loĝi en la ĝardeno!

– Rigardu, Mark!

Mark? Ŝi jam nomis ĝin! Kaj de kie ŝi certas, ke la hundo estas li, sed ne ŝi!

– Rigardu, kiel nia kato ĝojas, ke vi loĝos kun ni!

Ne, ne, mi ne ĝojas, mi volas ke li foriru!

– Iru kun mi kaj mi donos al vi iom da viando, Mark!


Mizera mondo!



## Jubileoj Rusa historio



La 9-an de januaro estis la 150-a datreveno de Aleksandr Herzen – elstara rusa pensulo, verkisto, revoluciulo, fondinto de la koncepto “rusa socialismo” kaj homo, kies ideoj posteuloj konsideris sin ĉiuj postaj generacioj de la rusaj revoluciuloj kaj opoziciuloj de ĉiuj



tendencoj – ĝis la falo de Sovetunio. Kvankam dum lastaj 30 jaroj lia nomo kaj heredaĵo estas iom forgesataj kaj neglektataj, lia kontribuo al la rusa penso, kulturo kaj eĉ tuta historio nekontesteblas.

La 22-an de aprilo estas la 150-jara datreveno de Vladimir Lenin. Malgraŭ plene kontrastaj pritaksoj de lia agado kaj influo je Rusio, tiu influo estas grandega, kaj ne preteratentbla. Por omaĝi la du datrevenojn, ni publikigas la artikolon de Lenin pri Herzen, verkitaj okaze de la 100-jara jubileo de la lasta, en traduko de esperantisto el Uljanovsk *Jurij Finkel*.

### Memore al Herzen

#### V. I. Lenin

Pasis cent jaroj post la naskiĝtago de Herzen<sup>1</sup>. Lin honoras la tuta liberala Rusio, zorgeme ĉirkaŭirante seriozajn demandojn de socialismo, skrupule kaŝante, per kio diferencis la revoluciulo Herzen disde liberalulo. Rememoras Herzen-on ankaŭ la dekstra gazetaro, mensoge kredigante, ke Herzen rezignis la revolucion en la fino de sia vivo. Kaj en la eksterlandaj, liberalaj kaj populistaj<sup>2</sup>, paroloj pri Herzen regas nur frazumado.

La laborista partio devas rememori Herzen-on ne por filistra glorado, sed por klarigo de siaj taskoj, por klarigo de la nuna historia loko de la verkisto, ludinta grandan rolon en preparo de la rusa revolucio.

Herzen apartenis al la generacio de nobelaj, bienulaj revoluciuloj de la unua duono de la pasinta jarcento. La nobeloj donis al Rusio Biron-ojn kaj Arakĉejev-ojn<sup>3</sup>, sennombrajn «ebriajn oficirojn, malpacemulojn, kartludantojn, heroojn de foiroj, hundoposedantojn, batemulojn, vipemulojn, serajlulojn», kaj

---

<sup>1</sup> Notojn al la artikolo vidu en ĝia fino.

ankaŭ belanimajn Manilov-ojn<sup>4</sup>. «Sed inter ili, — skribis Herzen, — disvolviĝis la homoj de la 14-a de decembro<sup>5</sup>, falango de herooj, nutritaj, kiel Romulo kaj Remo, per lakto de sovaĝa besto... Tio estas iaj prodoj, forĝitaj el pura ŝtalo de la kapo ĝis la piedoj, batalkamaradoj, elirintaj konscie al evidenta pereco, por veki al nova vivo la junan generacion kaj purigi la infanojn, naskitajn en medio de tiranio kaj servileco»<sup>6</sup>.

Herzen estis unu el tiuj infanoj. La ribelo de la decembriroj vekis kaj «purigis» lin. En la servuta Rusio de la 40-aj jaroj de la XIX-a jarcento li sukcesis leviĝi sur tian alton, ke ekstaris samnivele kun la plej grandaj pensuloj de sia tempo. Li alproprigis la dialektikon de Hegel. Li komprenis, ke ĝi estas «algebro de revolucio». Li iris pli malproksime, ol Hegel, al materiismo, sekvante Feuerbach-on<sup>7</sup>. La unua el liaj «Leteroj pri esploro de la naturo» — «Empirio kaj ideismo», — verkita en la 1844-a jaro, montras al ni pensulon, kiu, eĉ nun, estas je kapo pli alta ol amasego da modernaj natursciencistoj-empiristoj kaj ol multego da nunaj filozofoj, ideistoj kaj duonideistoj. Herzen aliris tute proksime al la dialektika materiismo kaj haltis antaŭ la historia materiismo.

Ĝuste tiu «halto» kaŭzis la spiritan fiaskon de Herzen post la malvenko de la revolucio de la 1848-a jaro. Herzen jam estis forlasinta Rusion kaj observis tiun revolucion senpere. Li estis tiam demokrato, revoluciulo, socialisto. Sed lia «socialismo» apartenis al tiuj sennombraj en la epoko de la 48-a jaro formoj kaj specoj de burĝa kaj etburĝa socialismo, kiuj estis definitive mortigitaj de la juniaj tagoj. Esence, tio estis tute ne socialismo, sed sentimentala frazo, bondezira revo, en kiu esprimis sian tiaman revoluciecon la burĝa demokratio, kaj ankaŭ la proletaro, ankoraŭ ne liberiĝinta el sub ties influo.

La spirita fiasko de Herzen, lia profunda skeptikeco kaj pesimismo post la 1848-a jaro estis fiasko de la burĝaj iluzioj en socialismo. La spirita dramo de Herzen estis kreaĵo kaj reflektado de tiu mondhistoria epoko, kiam revolucieco de la burĝa demokratio jam estis mortanta (en Eŭropo), sed revolucieco de la socialisma proletaro ankoraŭ ne maturiĝis. Tion ne komprenis kaj ne povis kompreni la kavaliroj de liberala rusia frazumado, kiuj kovras nun sian kontraŭrevoluciecon per pompaj frazoj pri skeptikeco de Herzen. Ĉe tiuj kavaliroj, kiuj perfidis la rusan revolucion de la 1905-a jaro, kiuj forgesis eĉ pensi pri la granda nomo de revoluciulo, skeptikeco estas formo de transiro el demokratio al liberalismo, — al tiu rampanta, malnobla, malpura kaj besta liberalismo, kiu mortpafadis laboristojn en la 48-a jaro, kiu restarigadis la detruitajn tronojn, kiu aplaŭdadis al Napoleono III kaj kiun malbenadis, ne povante kompreni ĝian klasan naturon, Herzen.

Ĉe Herzen skeptikeco estis formo de transiro el iluzioj de «superklasa» burĝa demokratismo al severa, nefleksebla, nevenkebla klasa batalo de la proletaro. Pruvo: «Leteroj al la malnova kamarado», al Bakunin, verkitaj jaron antaŭ la morto de Herzen, en la 1869-a jaro. Herzen rompas kun la anarkiisto Bakunin. Tamen, Herzen vidas ankoraŭ en tiu rompo nur malkonsenton en taktiko, sed ne abismon inter mondpercepto de proleto, certa pri venko de sia klaso, kaj de etburĝo, malesperiĝinta pri sia saviĝo. Tamen, Herzen ripetas ree ankaŭ ĉi tie la malnovajn burĝ-demokratiajn frazojn, kvazaŭ socialismo devas elpaŝi kun «prediko, egale turnita al la laboranto kaj al la mastro, al la terkultivisto kaj al la urbano». Sed tamen, rompante kun Bakunin, Herzen turnis siajn rigardojn ne al liberalismo, sed al la Internacio, al tiu Internacio, kiun gvidis Markso, — al tiu Internacio, kiu komencis «kunigi armeojn» de la proletaro, unuigi «la laboristan mondon», «kiu forlasas la mondon de konsumantoj sen laboro»!

Ne kompreninte la burĝ-demokratian esencon de la tuta movado de la 1848-a jaro kaj de ĉiuj formoj de la antaŭmarksa socialismo, Herzen des pli ne povis kompreni la burĝan naturon de la rusa revolucio. Herzen estis la fondinto de la «rusa» socialismo, de la «popolemismo». Herzen vidis «socialismon» en liberigo de la kamparanoj kun tero, en la komunuma terposedo<sup>8</sup> kaj en la kamparana ideo de «rajto pri tero». Siajn ŝatatajn pensojn pri tiu temo li disvolvadis sennombrajn fojojn.

Efektive en tiu instruo de Herzen, same kiel en la tuta rusa popolemismo — ĝis la paliĝinta popolemismo de la nunaj «socialistoj-revoluciuloj» — ne ekzistas eĉ grano da socialismo. Tio estas la sama sentimentala frazo, la sama bondezira revo, esprimanta revoluciecon de la burĝa kamparana demokratio en Rusio, kiel ankaŭ diversaj formoj de «socialismo de la 48-a jaro» en la Okcidento. Ju pli da tero ricevus la kamparanoj en la 1861-a jaro<sup>9</sup> kaj ju malpli koste ili ĝin ricevus, des pli forte estus rompita la potenco de bienuloj-servutistoj, des pli rapide, libere kaj vaste irus disvolviĝo de kapitalismo en Rusio. La ideo de «rajto pri tero» kaj de «egaliga disdivido de la tero» estas nenio alia, ol formulo de revoluciaj streboj al egaleco flanke de la kamparanoj, luktantaj por plena renverso de la bienula potenco, por plena neniigo de la bienula terposedo.

La revolucio de la 1905-a jaro plene pruvis tion: unuflanke, la proletaro elpaŝis tute memstare en gvido de la revolucia batalo, kreinte la social-demokratian laboristan partion; aliflanke, la revoluciaj kamparanoj (la «laboruloj» kaj la «Kamparana unio»<sup>10</sup>), batalante por ĉiaj formoj de neniigo de la bienula terposedo ĝis «abolo de privata proprieto pri tero», batalis ĝuste kiel mastroj, kiel etaj entreprenistoj.

Nuntempe disputoj pri «socialismeco» de la rajto pri tero k. s. servas nur al malklarigo kaj kovro de la vere grava kaj serioza historia demando: pri malsameco de intereso de la liberala burĝaro kaj de la revolucia kamparanaro en la rusa burĝa revolucio; alivorte pri la liberala kaj la demokratia, pri la «kompromisa» (monarkia) kaj la respublika tendencoj en tiu revolucio. Ĝuste tiu demando estis starigita de «La Sonorilo»<sup>11</sup> de Herzen, se rigardi al la esenco de la afero, sed ne al frazoj, — se esplori la klasbatalon, kiel la bazon de «teorioj» kaj instruoj, sed ne inverse.

Herzen kreis liberan rusan gazetaron en eksterlando — en tio estas lia grandega merito. «La Polusa Stelo»<sup>12</sup> relevis la tradicion de la decembristoj. «La Sonorilo» (1857–1867) batalis por la emancipo de la kamparanoj. La sklava silento estis rompita.

Sed Herzen apartenis al la bienula, nobela medio. Li forlasis Rusion en la 1847-a jaro, li ne vidis la revolucian popolon kaj ne povis kredi je ĝi. El tio sekvis lia liberala apelacio al la «regantoj». El tio sekvis liaj sennombraj mielaj leteroj en «La Sonorilo» al Aleksandro II la Pendumisto, kiujn ne eblas nun legi sen abomeno. Ĉerniŝevskij, Dobroljubov, Serno-Solovjeviĉ<sup>13</sup>, kiuj estis reprezentantaj la novan generacion de nenobelaj revoluciuloj, estis milfoje pravaj, kiam ili riproĉis al Herzen pri tiuj deiroj el demokratismo al liberalismo. Tamen la justeco postulas diri, ke ĉe ĉiuj hezitaj de Herzen inter demokratismo kaj liberalismo, la demokratio en li tamen venkadis.

Kiam unu el la plej abomenaj ekzempleroj de liberala servileco, Kavelin, admirinta antaŭe «La sonorilon» ĝuste pro ties liberalaj tendencoj, ekribelis kontraŭ konstitucio, atakis revolucian agitadon, ekribelis kontraŭ «perforto» kaj

alvokoj al ĝi, komencis prediki paciencon, Herzen rompis kun tiu liberala saĝulo. Herzen ekatakis lian «magran, absurdan, malutilan pamfleton», verkitan «kiel kaŝa gvidilo por la libéralema registaro», liajn «politik-sentimentalajn sentencojn», montrantaj «la rusan popolon bruto, kaj la registaron saĝulo». «La Sonorilo» publikigis artikolon «Epitafo», en kiu ĝi vipis «profesorojn, plektantajn putran araneaĵon de siaj orgojle mizeraj ideetoj, eksprofesorojn, iam simplanimaj, kaj poste koleriĝintaj, vidante, ke sana junularo ne povas kunsenti ilian skrofolan penson». Kavelin tuj rekonis sin en tiu portreto.

Kiam estis arestita Ĉerņiŝevskij, la malnobla liberalulo Kavelin skribis: «La arestoj ne ŝajnas al mi indignindaj... la revolucia partio opinias ĉiujn rimedojn bonaj, por renversi la registaron, kaj tiu defendas sin per siaj rimedoj». Kaj Herzen kvazaŭ estis respondanta al tiu «konstituci-demokrato», dirante pri la juĝo super Ĉerņiŝevskij: «Kaj ĉi tie mizeraj homoj, homoj-herbo, homoj-limakoj diras, ke ne indas mallaŭdi tiun bandon de rabistoj kaj sentaŭguloj, kiu regas nin».

Kiam liberalulo Turĝenev<sup>14</sup> skribis privatan leteron al Aleksandro II kun certigo pri sia lojaleco kaj donacis du ormonerojn por soldatoj, vunditaj ĉe subpremo de la pola ribelo, «La Sonorilo» skribis pri «grizhara Magdalena (virgenra), skribinta al la siro, ke ŝi ne dormas pro turmentiĝo, ke la siro ne scias pri trafinta ŝin pento». Kaj Turĝenev tuj rekonis sin.

Kiam la tuta bando da rusaj liberaluloj forturniĝis de Herzen pro lia defendo de Polio, kiam la tuta «klera socio» forturniĝis de «La Sonorilo», Herzen ne konfuziĝis. Li plu defendadis liberon de Polio kaj vipadis la subpremantojn, torturantojn, pendumistojn de Aleksandro II. Herzen savis la honoron de la rusa demokratio. «Ni savis la honoron de la rusa nomo, — skribis li al Turĝenev, — kaj por tio ni suferis de la sklava plimulto».

Kiam estis ricevata informo, ke servutulo murdis la bienulon pro atenco al la honoro de sia fianĉino, Herzen aldonadis en «La Sonorilo»: «Kaj li faris bonege!». Kiam oni sciigadis, ke estas enkondukataj militistaj estroj por «trankvila» «liberigo», Herzen skribis: «La unua saĝa kolonelo, kiu kune kun sia taĉmento aliĝos al la kampanoj, anstataŭ ol sufoki ilin, eksidos sur la tronon de Romanov-oj». Kiam kolonelo Reitem mortpafis sin en Varsovio (1860), por ne esti helpanto de pendumistoj, Herzen skribis: «Se mortpafi, do mortpafu tiujn generalojn, kiuj ordonas pafi al senarmuloj». Kiam estis buĉitaj 50 kampanoj en Bezdna kaj estis ekzekutita ilia gvidanto Antono Petrov (la 12-an de aprilo 1861)<sup>15</sup>, Herzen skribis en «La Sonorilo»:

«Ho, se miaj vortoj povus atingi vin, laborulo kaj suferanto de la rusa tero!.. kiel mi instruus vin malestimi viajn spiritajn paŝtistojn, kiujn starigis super vi la peterburga sinodo kaj la germana caro... Vi malamas la bienulon, malamas la oficiston, timas ilin — kaj vi tute pravas; sed vi plu kredas je la caro kaj la ĉefpastro... ne kredu al ili. La caro estas kun ili, kaj ili estas de li. Lin vi vidas nun, vi, la patro de la junulo, murdita en Bezdna, vi, la filo de la patro, murdita en Penzo... Viaj paŝtistoj estas malkleraj, kiel vi, malriĉaj, kiel vi... Tia estis la suferinta por vi en Kazano alia Antonio (ne la episkopo Antonio, sed la Antono de Bezdna)... La korpoj de viaj sanktuloj ne faros kvardek ok miraklojn, preĝo al ili ne kuracos dentodoloron; sed viva memoro pri ili povas fari unu miraklon — vian liberiĝon».

El tio videblas, kiel malnoble kaj malalte kalumnias Herzen-on nestiĝintaj en la sklava «leĝa» gazetaro niaj liberaluloj, levante la malfortajn

flankojn de Herzen kaj prisilentante la fortajn. Ne kulpo de Herzen, sed lia malfeliĉo estas tio, ke li ne povis vidi revolucionan popolon en Rusio mem en la 40-aj jaroj. Kiam li ekvidis ĝin en la 60-aj — li sentime ekstaris sur la flankon de la revolucia demokratio kontraŭ liberalismo. Li luktis por venko de la popolo super la carismo, sed ne por negoco de la liberala burĝaro kun la bienula caro. Li levis la standardon de la revolucio.

Honorante Herzen-on, ni vidas klare tri generaciojn, tri klasojn, agintajn en la rusa revolucio. Unue estis nobeloj kaj bienuloj, la decembristoj kaj Herzen. Malvasta estas rondo de tiuj revoluciuloj. Ili estas terure foraj de la popolo. Sed ilia afero ne malaperis vane. La decembristoj vekis Herzen-on. Herzen disvolvis revolucionan agitadon.

Ĝin subkaptis, vastigis, fortigis, hardis la nenobelaj revoluciuloj, komencante de Ĉerņiŝevskij kaj finante per la herooj de la «Popola volo»<sup>16</sup>. Pli vasta iĝis la rondo de la batalantoj, pli proksima iĝis ilia ligo kun la popolo. «Junaj rudristoj de la estonta tempesto» — nomis ilin Herzen. Sed tio ne estis ankoraŭ la tempesto mem.

La tempesto estas moviĝo de la popolamasoj mem. La proletaro, la sola ĝisfine revolucia klaso, leviĝis ĉe ilia kapo kaj unuafoje levis al malfermita revolucia batalo milionojn da kamparanoj. La unua atako de la tempesto estis en la 1905-a jaro. La sekva komencas kreski antaŭ niaj okuloj.

Honorante Herzen-on, la proletaro lernas per lia ekzemplo pri granda valoro de revolucia teorio; — lernas kompreni, ke abnegacia fideleco al la revolucio kaj alparolo kun revolucia prediko al la popolo ne malaperas vane eĉ tiam, kiam tutaj jardekoj disigas semadon de rikolto; — lernas trovi rolon de diversaj klasoj en la rusa kaj internacia revolucio. Riĉigita per tiuj lecionoj, la proletaro trabatos al si vojon al libera alianco kun socialistaj laboristoj de ĉiuj landoj, dispreninte tiun abomenan monstron, la caran monarkion, kontraŭ kiu Herzen la unua levis la grandan batalan standardon per alparolo al la amasoj kun libera rusa vorto.

*Ĵurnalo «Social-Demokrato» n-ro 26,  
la 8-an de majo (la 25-an de aprilo) 1912*

## **Notoj**

1. A. I. Herzen (prononcu [hércen]) (1812–1870) — granda rusa revoluciulo-demokrato, filozofo-materiisto, publicisto kaj verkisto; fondinto de la «rusa», «kamparana» socialismo. Herzen eniris en la liberigan movadon kiel nobela revoluciulo, daŭriginta la tradiciojn de la decembristoj. En 1829–1833 dum lernado en la Moskva universitato li gvidis societon de progresema revolucia junularo, studanta politikajn kaj teoriajn instruojn de revoluciaj pensuloj de la XVII-a jarcento kaj de socialistoj-utopiistoj. En 1834 kune kun aliaj anoj de la societo li estis arestita kaj ekzilita. Post reveno el la ekzilo en 1842 li loĝis en Moskvo. Verkitaĵoj tiam de li filozofiaj laboraĵoj «Diletantismo en scienco» kaj «Leteroj pri esplorado de la naturo» ludis gravan rolon en disvolvado de la rusa materiisma filozofio. En 1847 pro persekutoj de la cara registaro Herzen elmigris. En 1852 li fondis en Londono rusan tipografion kaj metis komencan al libera rusa eksterlanda gazetaro. En 1855 li komencis eldoni almanakon «La Polusa Stelo», kaj en 1857, kune kun N. P. Ogarjov, revuon «La Sonorilo».

2. Popolemismo — ideologio en Rusio en 1860–1910-aj jaroj, strebanta proksimiĝon de la intelektularo al la simpla popolo (precipe al la kamparanoj) por trovi siajn radikojn. Tiu idea fluo estis dominanta en 1860–1880-aj jaroj en Rusio. Ekzistis diversaj direktoj de popolemismo: revolucia (el kiu en la komenco de la XX-a jarcento elkreskis la partio de socialistoj-revoluciuloj kaj kelkaj aliaj, ankaŭ la social-demokratian

laboristan partion konsistigis eksaj revoluciaj popolemistoj, transirintaj al pozicioj de marksismo), liberala (el kiu elkreskis la partio de konstituciaj demokratioj), anarkiisma.

3. E. I. Biron (1690–1772) — grandpotenca favorito de la imperiestrino Anna Ivanovna, deveninta el etaj kurlandaj nobeloj. Ne okupante oficialajn postenojn kaj ne estante rusia regnanto, li faris grandan influon al la interna kaj parte ekstera politiko de Rusio. Li establis teroran reĝimon en la lando, plenumadis politikon de germanigo de la ŝtata aparato, uzadis sian pozicion por prirabado de la rusia ŝtata trezoro, por korupto kaj spekulado. Post la morto de Anna Ivanovna li estis dum ioma tempo reganto de la ŝtato; en 1740 li estis renversita.

A. A. Arakĉev (1769–1834) — unu el la plej reakciaj reprezentantoj de la cara aŭtokratio, grafo, milita ministro ĉe Aleksandro I, distingigis per brutaleco kaj krueleco, faris grandegan influon al la interna kaj ekstera politiko de Rusio. Kun lia nomo estas ligita tuta periodo de reakcia polica arbitro, kruda militismo, spionado, korupto, subaĉetado kaj formalismo — tiel nomata «reĝimo de Arakĉev».

4. Manilov — persono de romano «Malvivaj animoj» de N. Gogol: sentimentalaj, bonanima bienulo, li simbolas vanajn revojn kaj malplenan babiladon.

5. La homoj de la 14-a de decembro — t. e. la decembristoj — nobeloj, ribelintaj kontraŭ servuteco kaj aŭtokratio la 14-an de decembro 1825.

6. Lenin citas verkon de Herzen «Finoj kaj komencoj».

7. G. W. F. Hegel (1770–1831) — granda germana filozofo — objektiva ideisto, ideologo de la germana burĝaro. La historia merito de Hegel estas profunda kaj ĉiufanka ellaboro de dialektiko, kiu servis kiel unu el la teoriaj fontoj de la dialektika materiismo. Tamen la dialektiko de Hegel havis ideisman karakteron. Ĝi estis dense ligita kun lia konservema, metafizika sistemo. Laŭ siaj soci-politikaj konceptoj Hegel estis adepto de konstitucia monarkio.

L. A. Feuerbach (prononcu: [fojberbâĥ]) (1804–1872) — elstara germana filozofo-materiisto kaj ateisto, unu el la antaŭuloj de marksismo. Feuerbach kritikis la ideisman filozofion de Hegel, montris ligan de ideismo kun religio; tamen en kompreno de la sociaj fenomenoj li restis ideisto. Li ne sukcesis kompreni rolon de praktiko en ekonomo kaj socia evoluo. En la lastaj jaroj de sia vivo Feuerbach interesiĝis pri socialisma literaturo, legis «La Kapitalon» de Markso kaj en 1870 aniĝis al la social-demokratia partio de Germanio.

8. Vilaĝa komunuma terposedo en Rusio estis formo de komuna kamparana uzado de la tero, karakterizata per deviga rotacio de parceloj kaj per nedividitaj arbaroj kaj paŝtejoj. Ĝiaj principaj trajtoj estis kolektiva respondeco, perioda redistribuo de la tero sen rajto rifuzi, malpermeso de ĝia aĉeto kaj vendo. La bienuloj kaj la cara registaro uzis la vilaĝan komunumon por intensigi feŭdan subpremon kaj elpremi pagojn el la popolo.

9. La «kamparana reformo» de la 1861-a jaro abolis la servutecon en Rusio. Rezulte de ĝi la bienuloj povis fortranĉi por si pli ol kvinonon aŭ eĉ du kvinononj de la kamparana tero. Ili retenis posedon de la plej bonaj partoj de la kamparanaj terpecoj (arbaroj, herbejoj k. t. p.), sen kiuj la kamparanoj ne povis okupiĝi pri sendependa terkultivado. Elaĉetaj pagoj de kamparanoj por iliaj parceloj estis nenio alia, ol prirabo fare de la bienuloj kaj la cara registaro. Por pagi siajn ŝuldojn, la kamparanoj devis ricevi krediton por 49 jaroj kun kvoto 6%. Lenin priskribis la «kamparanan reformon» de 1861 kiel la unuan agon de amasa perforto kontraŭ la kamparanaro por profito de kreskanta kapitalismo en agrikulturo.

10. «Laboruloj» — politika organizaĵo (1906–1917), aperinta unue kiel grupo de deputitoj de la unua Dumo (parlamento) el kamparanoj kaj intelektuloj de popolisma direkto.

«Kamparana unio» — revoluci-demokratia organizaĵo (1905–1907). Ĝi postulis politikajn liberecojn, tujan kunvokon de Konstituantaj asembleo, abolon de privata propio de tero, transdonon al kamparanoj sen elaĉeto de eklezia kaj ŝtata tero. Tamen ĝi konsentis al parta rekompenco de bienuloj, en kio montriĝis ĝia etburĝa hezitemo kaj nedecidemo.

11. «La Sonorilo» — politika revuo sub slogano «Vivos voco!» («Mi vokas vivulojn!»), eldonata de A. I. Herzen kaj N. P. Ogarjev en 1857–1865 en Londono kaj en 1865–1867 en Ĝenevo. Ĝi akuzadis arbitron de la aŭtokratio, ekspluatadon de kamparanoj

fare de bienuloj, alvokadis al revolucio kaj helpis al vekigo de la popolamasoj al lukto kontraŭ la cara registaro kaj la regantaj klasoj.

12. «La Polusa Stelo» — beletra kaj politika verkaro, eldonata en 1855–1862 en Londono, en 1868 en Ĝenevo de Herzen kaj Ogarjov. Entute estis eldonitaj 8 libroj. Per la titolo de la verkaro, kaj ankaŭ per desegno sur la kovrilo, montranta la kvin ekzekutitajn decembristojn, Herzen substrekis sian revolucionan heredecon de la decembristoj (decembristoj Bestujev kaj Rilejev en 1823–1825 estis eldonantaj almanakon kun sama titolo).

13. N. G. Ĉerniŝevskij (1828–1889) — granda rusa revolucia demokrato kaj utopia socialisto, sciencisto, verkisto, literatura kritikisto; unu el elstaraj antaŭuloj de la rusa social-demokratio. En 1862 li estis arestita kaj kondamnita al sep jaroj da punlaboro kaj eterna loĝado en Siberio, kie li restis dum 20 jaroj.

N. A. Dobroljubov (1836–1861) — granda rusa revolucia demokrato, elstara literatura kritikisto kaj filozofo-materiisto, proksima amiko de N. G. Ĉerniŝevskij. Ekde 1857 li estris kritik-bibliografian fakon de revuo «Samtempulo». Li estis nepaciebla malamiko de la aŭtokratio kaj servuteco, adepto de popola ribelo kontraŭ la cara registaro. Samvice kun A. I. Herzen, V. G. Belinskij kaj N. G. Ĉerniŝevskij li estis antaŭulo de la revolucia social-demokratio en Rusio.

A. A. Serno-Solovjeviĉ (1838–1869) — elstara aganto de la revoluci-demokratia movado de la 1860-aj jaroj. Li estis unu el organizintoj de la sekreta societo «Tero kaj Libero». En 1862 elmigris eksterlanden. Aŭtoro de akra pamfleto «Niaj hejmaj aferoj» kontraŭ liberalaj hezitaj de Herzen. Ekde 1867 — membro de la ĝeneva sekcio de la Internacio.


14. I. S. Turĝenev (1818–1883) — granda rusa verkisto, multe kontribuinta por disvolvo de la rusa literatura lingvo. En siaj verkoj li reflektis karakterajn kontraŭdirojn de la rusa socia vivo. Ardan proteston kontraŭ la servuteco Turĝenev kombinis kun modere liberalaj postuloj. Lenin diris, ke «Turĝenev... emis al modera monarkia kaj nobela konstitucio... lin forpuŝis la kampula demokratismo de Dobroljubov kaj Ĉerniŝevskij».

15. Temas pri kampanara ribelo en vilaĝo Bezdna de Kazana gubernio. Publikigo en 1861 de la manifesto pri abolo de servuteco kaŭzis elreviĝon kaj indignon de kampanaroj, trompitaj en siaj esperoj. Ili ne kredis pri vereco de la publikigita teksto kaj opiniis, ke la bienuloj kaj oficistoj kaŝis la veran manifeston. Printempe de la 1861-a jaro en vico da gubernioj okazis kampanaraj ribeloj. La plej granda estis ribelo de kampanaroj de vilaĝo Bezdna. La movadon gvidis juna kampanaro Antono Petrov. Laŭ alvoko de Petrov la kampanaroj rifuzis servuti kaj pagi tributon al bienuloj, estis grenon el bienulaj tenejoj k. t. p. La ribelo en Bezdna estis kruele subpremita: estis mortpafitaj kaj mortis pro vundoj 91 homoj, pli ol 350 estis vunditaj. Antono Petrov estis pafekzekutita. La tragedio en Bezdna vokis vastan eĥon en la progresemaj tavoloj de la rusa socio.

16. «Popola volo» (ankaŭ tradukeblas kiel «Popola libero») — sekreta politika organizaĵo de popolemistoj-teroristoj, aperinta en 1879 pro skismo de popolista organizaĵo «Tero kaj Libero». Restante sur pozicio de popolisma utopia socialismo, la membroj de la «Popola volo» ekstaris sur la vojon de politika batalo, celante renverson de la aŭtokratio kaj konkeron de politika libero. Ilia programo inkludis organizon de «konstanta popola reprezentado», elektita per universala elektorato, proklamon de demokratiaj liberecoj, transdonon de la tero al la popolo kaj ellaboron de rimedoj por transiro de fabrikoj en la manojn de la laboristoj. La «Popola volo» faris heroan batalon kontraŭ la cara aŭtokratio, sed deirante de la erara teorio pri «aktivaj» herooj kaj «pasiva» amaso, ili intencis atingi rearanĝon de la socio sen partopreno de la popolo, per propraj fortoj, per individua teroro, terurigo kaj malorganizado de la registaro. Post la 1-a de marto 1881 (murdo de Aleksandro II) la registaro per kruelaj persekutoj, ekzekutoj kaj provokoj detruis la organizaĵon. Pluraj penoj revivigi la «Popolan volon» en 1880-aj jaroj estis senrezultaj. Inter aliaj en 1886 aperis grupo, gvidata de A. I. Uljanov (frato de V. I. Lenin) kaj P. J. Ŝevirjov, sekvanta la tradiciojn de la «Popola volo». Post malsukcesa provo organizi atenton al Aleksandro III en 1887 la grupo estis malkovrita kaj ĝiaj aktivuloj estis ekzekutitaj.

*El la rusa tradukis Jurij Finkel (Uljanovsko)*

(*vd. ankaŭ <http://esperanto.mv.ru/Marksismo/eo/Lenin/index.html>*)



La prezentata studenta kanto estas unu el la plej malnovaj el tiuj, kiuj estas plenumataj ĝis nun. Ĝi tute ekzistis fine de la 19-a jc., sed, laŭ certaj supozoj,, aperis jam en 1840-aj jaroj. Dum tiu tempo ĝi evoluis, aperadis ĉiam novaj strofoj, kaj la ekzistantaj komence iom ŝanĝiĝis – verŝajne, komence ne estis strofoj pri Darvino kaj Mendeleev, kaj apenaŭ oni en la 19-a jc. kantis pri neekzisto de dio, ktp. Ĉiukaze, tiom longa vivkapablo de la kanto faras ĝin ne simpla ekzemplo de la studenta folkloro, sed al ĉiuj konata fenomeno de la rusa kulturo.

## Колумб Америку открыл<sup>5</sup>

Колумб Америку открыл,  
Страну для нас совсем чужую.  
Дурак, он лучше бы открыл  
На нашей улице пивную!

Припев: По рюмочке, по маленькой  
Налей, налей, налей,  
По рюмочке, по маленькой,  
Чем поят лошадей.  
– А я не пью! – Врёшь – пьёшь!  
– Ей-Богу, нет! – А Бога нет!  
Так наливай студент студентке!  
Студентки тоже пьют вино.  
Непьющие студентки редки,  
Они повымерли давно.

Коперник целый век трудился  
Чтоб доказать земли вращенье.  
Дурак, зачем он не напился,  
Тогда бы всё пришло в движенье.

Припев.

А Ньютон целый век трудился,  
Чтоб доказать тел притяженье.  
Дурак, он лучше бы влюбился,  
Тогда бы не было сомненья.

Припев.

Чарльз Дарвин целый век трудился,  
Чтоб доказать происхождение.  
Дурак, он лучше бы женился,  
Тогда бы не было сомненья.

Припев.

А Менделеев век трудился,

## Kolumbo trovis novan teron

Kolumbo trovis novan teron,  
Por ni tutfremdan kontinenton.  
Stultulo, trovus li prefere  
Drinkejon ĉipan por studentoj!

Refreno: Po pokalet' kaj po glaset'  
Verŝata estu vin',  
Po pokalet' kaj po glaset' –  
Trinkuj' de ĉevalin'.  
– Ne drinkas mi! – Mensogas vi!  
– Ja scias Di'! – Ne estas Di'!  
Do verŝu knab' al najbarino!  
Knabinoj ŝatas vinon ja.  
Ne vivas studentin' sen vino,  
Senvinaj malaperis jam.

*Kopernik* penis malmodere  
Por pruvi Teran rotacion.  
Stultul', satdrinkus li prefere  
Kaj pruvus korpe l' teorion.

Rf.

Neŭtono penis malmodere  
Por pruvi forton de gravito.  
Stultul', ekamus li prefere –  
Gravito estus senevita!

Rf.

Darvino penis malmodere  
Por pruvi homan originon.  
Stultul', edziĝus li prefere,  
Praktike li kontrolus tion.

Rf.

Kaj Mendeljejev la tabelon

<sup>5</sup> La varianto estas fiksita de L. Novikova en 1970 en la studenta medio de la urbo Ĉelabinsk



Чтоб элементы загнать в клетки.  
 Дурак, он лучше б научился  
 Гнать самогон из табуретки.  
 Припев.

Inventis por la elementoj.  
 Stultul', distilus li prefere  
 Hejmb Brandon el la taburetoj.

Rf.  
 Traduko de Ludmila Novikova (2019)

KOLUMBO TROVIS NOVANTERON

Vigle

I. Kolumbo Ameriku de la kromstranoj d'iaso kun ĉiuj. Du rak! Ĉar oni ne el-  
 kromstranoj. Pripevo sur niaj uli, ĉi tiu!  
 Por morko, por maldekstra, na, la, la, la. la!  
 Por morko, por maldekstra, ĉi tiu!

— Tak ja ne pivo! — Vreŝy, p'eshy! — Eyi-bogu, net! — Vreŝy, p'eshy!

Tak na li vai, frat, na li vai ĉi ĉi do  
 ka pli vi pi vai. Vi no! Vi  
 no, vi, no, vi, no — o no na radost nam da no!

CERBE kaj KORE

n-ro 13 (81), marto 2020

Kultura suplemento al la revuo "Ponto" n-ro 111 [eksa Bulteno de REU (BdR)]

"Ponto" estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "Rusia Esperantista Unio  
 Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de  
 ĝusta indiko de la fonto

KĈK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj sciencopopularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru).

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktotfino 13.03.2020